

DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

◉ dumonata kristana revuo en esperanto ◉ N-ro 3 (828) 2001

La Spirito sur la eklezio(j)n?



Rita ROESSLER

LA TEKSTO DE LA EKUMENA ĈARTO DE STRASBURGO

La alveno de *Adoru* Esperantistaj informoj
Nova traduko de la *Epistolo al la Romanoj*

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala,
kunlaboranta kun UEA

Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.

Prezidanto: Jacques TUINDER

✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk
☎ +31 251 231941; ✉ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎ +31 1724 20222;
✉ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn,
Germanio; ☎ +49 7131 162688; ✉ keli.@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume €15,- ☉ Membro-subtenanto €22,-
☉ Nura abono: pagante rekte al KELI €12,-
☉ pagante al Libroservo €14,- Sendoj de
okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la
kasisto de KELI ☉ Se estas en via lando UEA-
poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu
prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI
☉ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0)5 49 46 80 21;
✉ diaregno@altern.com.

Manuskriptojn oni sendu **nur al la Redaktoro!**
Abonprezo sen membreco en KELI: €12,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al
la kaso de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas
nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko
permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton.
Specimenon kun represo aŭ traduko oni
sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA
✉ pf. 59, PL 41-250 CZELADŹ, Pollando
☎ +48 32 763 37 13; ✉ kleja@post.pl

ENHAVTABELO

- 51 **La Ekumena Ĉarto**
La kompleta teksto
- 59 **Adoru**
Nia nova ekumena Diservo-libro
- 61 **Naskiĝinta komunumo**
Prediko por nova Civito
- 69 **La Epistolo al la Romanoj**
La unua ĉapitro de la nova traduko
de Gerrit BERVELING

REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gelegantoj!

Kaj la Esperantistoj, kaj la Kristanoj
troviĝas en periodo, kiam homoj grupoj,
volas trovi difinon por sia esto kaj agado.
Ili do faras provojn por unuiĝi, por est-
abliĝi. Rilate tion, ni trovas en ĉi tiu
numero diversajn elementojn.

La teksto de la Ekumena Ĉarto, se
ne vere oficiala teksto en la senco de la
lastjardecaj dialogoj, alportas rigardon
al la futuro de interkristanaj rilatoj,
kaj provas malfermi iun ekumenismon,
kiu ŝajnis alveni al ne plu plibonigebla
punkto.

En Esperantismo, la eskatologiaj dis-
kutoj svarmis. El ili la Esperantistoj
sin mem difinas, kaj ankaŭ etikedas la
aliajn. Portantoj de diversaj esperoj
provas kunagadi inter si, kaj arigi al si
plurajn. Estus domaĝe, se tiuj streboj
konsekvence agadi rezultus en disiĝoj
kaj anatemoj. Des pli estas bezonata
dialogo inter ĉiuj bonvolemaj Esper-
antistoj, prenante en la ideoj kaj idealoj
de la aliaj bonajn aferojn. Neniu strebo
estas neglektinda, kiu unuigas la hom-
ojn. Neniu kondamnu, sed akceptu unu
la alian.

Bonvolemaj, ĉartaniĝu.

Philippe COUSSON

EKUMENA ĈARTO

(Charta Oecumenica)

Gvidlinioj

por la kresko de kunlaboro
inter la Eklezioj en Eŭropo

„Gloron al la Patro, kaj al la Filo, kaj al la Sankta Spirito!”

Kiel Konferenco de la eŭropaj Eklezioj (KEK) kaj Konsilio de la eŭropaj
episkoparaj Konferencoj (CCEE) ni firme intencas, laŭ la spirito de la du eŭropaj
Ekumenaj Asembleoj de Bazelo 1989 kaj Graz 1997, konservi kaj ankoraŭ
pliprogresigi la kunulecon kiu kreskis inter ni. Ni dankas nian Dion la Triunuon
kiu, pere de la Sankta Spirito, gvidas niajn paŝojn al pli kaj pli intensa kunuleco.

Jam firmiĝis diversaj formoj de ekumena kunlaboro, sed fidelaj je la preĝo
de Kristo: „Ke ili ĉiuj estu unu; kiel Vi, Patro, estas en mi, kaj mi en Vi, tiel ili
ankaŭ estu en ni; por ke la mondo kedu, ke Vi min sendis” (Joh 17,21), ni ne povas
senti nin kontentigitaj pri la nuna stato de la aferoj. Konsciaj pri nia kulpo kaj
pretaj al konvertiĝo, ni devas devontigi nin al supero de la dividoj kiuj daŭre
ekzistas inter ni, tiel ke ni kune anoncu, laŭ kredinda maniero, la mesaĝon de
la evangelio meze de la popoloj.

En la kuna aŭskulto de la Parolo de Dio entenata en la Sankta Skribo kaj vokataj
kredkonfesi nian komunan kredon kaj ankaŭ agi kune laŭ la vero kiun ni agnoskis,
ni volas doni ateston pri la amo kaj la espero por ĉiuj homaj estuloj.

En nia eŭropa kontinento, de Atlantiko al Uraloj, de Norda Kabo al Mediteraneo,
hodiaŭ pli ol iam karakterizita de kultura plurismo, ni volas devontigi nin kun
la Evangelio por la digno de la hompersono, kreita laŭ bildo de Dio, kaj kune
kontribui kiel Eklezioj al la repaciĝo de popoloj kaj kulturoj.

Ĉi-sence ni akceptas ĉi tiun Ĉarton kiel komunan sindevigon al dialogo kaj
al kunlaboro. Ĝi priskribas la fundamentajn ekumenajn taskojn kaj el ili ĝi
devenigas serion da gvidlinioj kaj sindevigoj. Ĝi devas akceli, je ĉiuj niveloj de
la vivo de la Eklezioj, ekumenan kulturon de la dialogo kaj de la kunlaboro kaj
ĉi-cele krei ligantan kriterion. Ĝi tamen ne havas iu ajn dogmo-moralinstruan aŭ
jur-eklezian karakteron. Ĝia normeco konsistas male el mem-devigo fare de la
Eklezioj kaj eŭropaj ekumenaj organizaĵoj. Ĉi tiuj povas, surbaze de ĉi tiu teksto,
formuli en sia medio, proprajn kompletigojn kaj komunajn orientadojn, kiuj
konkrete konsideru siajn specifajn defiojn kaj la devojn kiuj fontas el ĉi-lastaj.

I. NI KREDAS „LA EKLEZION, UNU, SANKTA, KATOLIKA KAJ APOSTOLA”

„Penu konservi la unuecon de la Spirito en la ligilo de paco. Estas unu korpo,
kaj unu Spirito, kiel ankaŭ vi estas vokitaj en unu espero de via voko; unu Sinjoro,
unu fido, unu bapto, unu Dio kaj Patro de ĉiuj, kiu estas super ĉiuj, kaj tra ĉiuj,
kaj en ĉiuj” (Efe 4,3-6).

1. Kune vokataj al la unueco de la kredo

Konforme kun la Evangelio de Jesuo Kristo, kiel ĝin atestas al ni la Sankta Skribo kaj estas formulita en la ekumena Kredkonfeso de Niceo-Konstantinopolo (381), ni kredas je Dio la Triunuo: Patro, Filo kaj Sankta Spirito.

Ĉar, per ĉi tiu Kredkonfeso, ni konfesas la Eklezion „unu, sankta, katolika kaj apostola”, nia neevitebla ekumena tasko estas igi videbla ĉi tiun unuecon, kiu ĉiam estas donaco de Dio.

Esencaj diferencoj koncerne la kredon malebligas ankoraŭ la videblan unuecon. Daŭre ekzistas malsamaj konceptadoj ĉefe koncerne la Eklezion kaj ĝian unuecon, la sakramentojn kaj la servadojn. Ne estas donite al ni rezignacii je tiu ĉi situacio. Jesuo Kristo malkaŝis al ni sur la kruco sian amon kaj la sekreton de la repaciĝo: sekvante Lin, ni volas fari ĉion eblan por superi problemojn kaj barojn, kiuj daŭre dividas la Ekleziojn.

Ni nin devigas

- sekvi la apostolan instigon al unueco de la letero al Efezanoj (Efe 4,3-6) kaj aktivi kun persistemo atingi komunan komprenon de la savodona mesaĝo de Kristo entenata en la Evangelio;
- agi, en la forto de la Sankta Spirito, por la videbla unueco de la Eklezio de Jesuo Kristo en la unika kredo, kiu trovas sian esprimon en la reciproka agnosko de la bapto kaj en la eŭkaristia kundivido, kiel ankaŭ en la komunaj atesto kaj servado.

II. IRADO AL VIDEBLA UNUECO DE LA EKLEZIOJ EN EŬROPO

„Per tio ĉiuj homoj scios, ke vi estas miaj disĉiploj, se vi havos amon unu al la alia” (Joh 13,35)

2. Kune anonci la Evangelion

La plej grava tasko de la Eklezioj en Eŭropo estas la kuna anonco de la Evangelio pere de la parolo kaj la agado, por la savo de ĉiuj homaj estuloj. Fronte al la multforma manko de orientigaj punktoj, al la forigo de la kristanaj valoroj, sed ankaŭ fronte al la multaspekta serĉo de senco, la kristaninoj kaj kristanoj estas aparte instigitaj atesti sian kredon. Ĉi-celne necesas, je la loka nivelo de la komunumoj, kreskanta sindevigo kaj interŝanĝo de spertoj koncerne katekizadon kaj paŝtistan agadon. Samtempe gravas, ke la tuta popolo de Dio sindevigu por kune disvastigi la Evangelion interne de la publika spaco de la socio, kaj doni al ĝi valoron kaj kredindecon ankaŭ pere de la sociala sindevigo kaj surprono de respondecioj en la politiko.

Ni nin devigas

- konigi al la aliaj Eklezioj niajn iniciatojn por la evangelizado kaj atingi interkonsentojn ĉi-teme, por eviti tiel damaĝan konkurecon kaj la danĝeron de novaj dividoj;

- rekoni ke ĉiu homa estulo povas elekti, libere kaj laŭkonscience, sian religian kaj eklezian apartenon. Neniu povas esti instigata al konvertiĝo pere de moralaj premoj aŭ materiaj instigiloj. Samtempe al neniu oni povas malebligi konvertiĝon kiu estu rezulto de libera elekto.

3. Iri unu renkonten al la alla

En la spirito de la Evangelio ni devas kune reprimari la historion de la kristanaj Eklezioj, kiun karakterizas, krom multaj bonaj spertoj, ankaŭ dividoj, malamikecoj kaj eĉ militaj interalfrontoj. La homa kulpo, la manko de amo, kaj la ofta ekspluatado de la kredo kaj de la Eklezioj antaŭvide al politikaj interesoj grave nocis al la kredindeco de la kristana atesto.

Ekumenismo, por la kristaninoj kaj kristanoj, komenciĝas tial per la renovigo de la koroj kaj per la dispono je pentofaro kaj konvertiĝo. Ni konstatas, ke la repaciĝo jam kreskis kadre de la ekumena movado.

Gravas rekoni la spiritaĵajn donacojn de la diversaj kristanaj tradicioj, lerni unuj de la aliaj kaj akcepti la donacojn unuj de la aliaj. Por plia progreso de ekumenismo aparte dezirindas kunaktivigi la spertojn kaj sopiratendojn de la gejunuloj kaj tre akceli ilian partoprenon kaj kunlaboron.

Ni nin devigas

- superi memsufiĉon kaj flankenmeti la antaŭjuĝojn, serĉi la reciprokan renkonton kaj esti unuj por la aliaj;
- akceli la ekumanan malfermitecon kaj kunlaboron en la sektoro de la kristana eduko, en la komenca kaj konstanta teologia formado, samkiel kadre de la esploro.

4. Kune agi

Ekumenismo jam esprimiĝas per multoblaj formoj de kuna agado. Multnombraj kristaninoj kaj kristanoj de diversaj Eklezioj vivas kaj laboras kune, kiel geamikoj, najbaroj, en laborejo kaj kadre de sia familio. Aparte, oni devas helpi la interkonfesiajn parojn vivi ekumenismon en la ĉiutago.

Ni rekomendas starigi kaj subteni je loka nivelo, regiona, nacia kaj internacia, organizaĵojn kiuj celu la ekumanan kunlaboron el dupartia kaj multipartia speco.

Je eŭropa nivelo necesas plifortigi la kunlaboron inter la Konferenco de la eŭropaj Eklezioj (KEK) kaj la Konsilio de la eŭropaj episkoparaj Konferencoj (CCEE) kaj realigi pliajn eŭropajn ekumenajn asembleojn.

Kaze de malpacoj inter Eklezioj necesas startigi kaj subteni klopodojn por perado kaj paco.

Ni nin devigas

- kune agi, je ĉiuj niveloj de la eklezia vivo, tie, kie ekzistas la antaŭkondiĉoj kaj kie tio ne estus malebligata de motivoj pro kredo kaj pli gravaj celoj;
- defendi la rajtojn de la minoritatoj kaj liberigi la spacon disde ekvivokoj kaj antaŭjuĝoj inter la plej grandaj kaj la malgrandaj eklezioj en niaj landoj.

5. Kune preĝi

Ekumenismo vivas per la fakto ke ni kune aŭskultas la parolon de Dio kaj ke ni lasas, ke la Sankta Spirito agu en ni kaj pere de ni. Per la forto de la graco tiel ricevita ekzistas hodiaŭ multaj klopodoj, pere de preĝoj kaj celebroy, strebantaj pliprofundigi la spiritan kunulecon inter la Eklezioj, kaj preĝi por la videbla unueco de la Eklezio de Kristo. Aparte doloriga signo pri la divido daŭre ekzistanta inter multaj kristanaj Eklezioj estas la manko de la eŭkaristia kundivido.

En kelkaj Eklezioj ekzistas rezervoj koncerne la kunan ekumenan preĝadon. Tamen, multaj ekumenaj celebroy, kunaj kantoj kaj preĝoj, aparte la Patro Nia, karakterizas nian kristanan spiritualecon.

NI nin devigas

- preĝi unuj por la aliaj kaj por la unueco de la kristanoj;
- lerni koni kaj ŝati la celebroy kaj aliajn formojn de spirita vivo de la aliaj eklezioj;
- ekiri direkte al la celo de la eŭkaristia kundivido.

6. Daŭrigi la dialogon

Nia komuna aparteno bazita en Kristo havas signifon pli fundamentan ol niaj malsamecoj en teologia kaj etika sektoroj. Ekzistas plureco kiu estas donaco kaj pliriĉiĝo, sed ekzistas ankaŭ kontrastoj pri doktrino, etikaj temoj kaj normoj de eklezia juro, kiuj male kondukis al rompoj inter la Eklezioj; decidigan rolon ĉi-sence ofte ludis ankaŭ specifaj historiaj cirkonstancoj kaj diversaj kulturaj tradicioj.

En la celo igi pli profunda la ekumenan kunulecon, nepre necesas daŭrigi la klopodojn kiuj celas la atingon de konsento de kredo. Sen unueco en la kredo ne ekzistas plena eklezia kunuleco. Ne ekzistas iu ajn alternativo al dialogo.

NI nin devigas

- konsciencas kaj intense daŭrigi la dialogon inter niaj Eklezioj je la diversaj ekleziaj niveloj kaj pritaksi kiaj el la rezultoj de la dialogo povu kaj devu esti deklarataj laŭ deviga formo fare de la ekleziaj aŭtoritatoj;
- serĉi la dialogon koncerne pridiskutatajn temojn, aparte pri temoj de kredo kaj etiko sur kiuj ŝvebas la risko de la divido, kaj kune debati pri tiaj temoj je la lumo de la Evangelio.

III. NIA KOMUNA RESPONDECO EN EŬROPO

„Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj” (Mat 5,9)

7. Kontribul al formado de Eŭropo

Dum la jarcentoj Eŭropo evoluis karakterizita en la religia kaj kultura sektoro ĉefe de kristanismo. Samtempe, pro la mankoj de la kristanoj, ĝi disvastiĝis tre malbone en Eŭropo kaj trans ĝiajn landlimojn. Ni konfesas nian kunrespondecon en tiu kulpo kaj petas pardonon pro ĝi al Dio kaj al la personoj.

Nia kredo helpas nin lerni de la pasinteco kaj devigi nin por ke la kristana kredo kaj la amo por la proksimumo disradiu esperon por la moralo kaj etiko, por eduko kaj kulturo, por politiko kaj ekonomio en Eŭropo kaj en la tuta mondo.

La Eklezioj akcelas unuiĝon de la eŭropa kontinento. Oni ne povas atingi la unuecon laŭ ĉiamdaŭra formo sen komunaj valoroj. Ni estas konvinkitaj, ke la spirita heredaĵo de kristanismo reprezentas inspiran forton kiu pliriĉigas Eŭropon. Sur la fundamento de nia kristana kredo ni nin devigas por Eŭropo humana kaj sociala, en kiu validu la homaj rajtoj kaj la bazaj valoroj de la paco, de la justeco, de la libereco, de la toleremo, de la partopreno kaj de la solidareco. Ni insistas pri la respekto de la vivo, pri la valoro de geedziĝo kaj de la familio, pri la prefera opcio favore al malriĉuloj, pri la dispono je pardono kaj ĉiuokaze pri la mizerikordo.

Kiel internaciaj Eklezioj kaj komunumoj, ni devas esti kontraŭ la danĝero ke Eŭropo evoluigu en integriĝinta Okcidento kaj malintegriĝinta Oriento. Ankaŭ la diverĝo inter Nordo kaj Sudo devas atentata. Necesas samtempe eviti ĉiun formon de eŭropocentrismo kaj plifortigi la respondecon de Eŭropo rilate al la tuta homaro, precipe rilate al la malriĉuloj de la tuta mondo.

NI nin devigas

- interkonsenti inter ni pri la enhavo kaj celoj de nia sociala respondeco kaj subteni kiel eble plej kune la aspirojn kaj la konceptadon de la Eklezioj fronte al la eŭropaj civilaj institucioj;
- defendi la fundamentajn valorojn kontraŭ ĉiuj atakoj;
- rezisti kontraŭ ĉiu klopodo ekspluati la religion kaj la Eklezion por etnaj aŭ naciismaj celoj.

8. Repaciĝi popolojn kaj kulturojn

Ni taksas kiel riĉaĵon de Eŭropo la multoblajn regionajn, naciajn, kulturajn kaj religiajn tradiciojn. Fronte al la multaj konfliktoj estas tasko de la Eklezioj surprени kune la servon al repaciĝo ankaŭ por la popoloj kaj la kulturoj. Ni scias, ke la paco inter la Eklezioj konsistigas ĉi-koncerne antaŭkondiĉon samgrade gravan.

Niaj kunaj zorgoj celas al pritakso kaj solvo de la politikaj kaj socialaj problemoj laŭ la spirito de la Evangelio. Ĉar ni valorigas la personon kaj ĉies dignon, ĉar temas pri bildo de Dio, ni nin devigas favore al la absoluta valor-egaleco de ĉiu homa estulo.

Kiel Eklezioj ni volas kune akceli la proceson de demokratiĝo en Eŭropo. Ni nin devigas por paca ordo, bazita sur la senperforta solvo de la konfliktoj. Ni tial kondamnas ĉiun formon de perforto kontraŭ la homaj estuloj, ĉefe kontraŭ virinoj kaj infanoj.

Repaciĝo signifas akceli socialan justecon interne de popolo kaj inter ĉiuj popoloj kaj aparte superi la abismon kiu dividas la riĉulon disde la malriĉulo, kiel ankaŭ la senlaborecon. Ni volas kontribui kune por ke oni donu humanan kaj indan akcepton al la virinoj kaj viroj kiuj migras, al rifuĝintoj kaj al tiuj, kiuj serĉas azilon en Eŭropo.

NI nin devigas

- stari kontraŭ ĉiu formo de naciismo kiu kondukas al subpremo de aliaj popoloj kaj naciaj minoritatoj kaj serĉi senperfortan solvon de la konfliktoj;
- plibonigi kaj plifortigi la staton kaj egalrajtecon de la virinoj en ĉiuj sektoroj de la vivo kaj akceli la ĝustan kunulecon inter virinoj kaj viroj ene de la Eklezio kaj de la socio.

9. Savogardi la kreaĵaron

Kredante je la amo de Dio la kreanto, ni agnoskas kun dankemo la donacon de la kreaĵaro, la valoron kaj belecon de la naturo. Ni tamen rigardas kun zorgemo al la fakto, ke la bonoj de la tero estas ekspluatataj sen atenti ilian internan valoron, sen atenti ilian malmultecon kaj sen zorgi pri la bono de la estontaj generacioj.

Ni volas devigi nin kune por realigi elteneblajn vivo-kondiĉojn por la tuta kreaĵaro. Koscias pri nia respondeco fronte al Dio, ni devas valorigi kaj plie evoluigi komunajn kriteriojn por decidi pri tio kio estas nelica laŭ etiko, kvankam realigebla laŭ scienco kaj teknologio. Ĉiuokaze la unika digno de ĉiu homa estulo devas esti unuaranga rilate al ĉio kio estas teknike realigebla.

Ni rekomendas la starigon fare de la eŭropaj Eklezioj de ekumena preĝotago por la savogardo de la kreaĵaro.

NI nin devigas

- pluevoluigi vivostilon en kiu, kontraŭ la regado de la ekonomika logiko kaj la devigo al konsumado, ni donu valoron al vivokvalito respondeca kaj eltenebla;
- subteni la naturmediajn organizaĵojn de la Eklezioj kaj la ekumenajn retojn kiuj alprenas respondecojn por la savogardo de la kreaĵaro.

10. Pilprofundiĝi la kunulecon kun hebrelismo

Speciala kunuleco ligas nin kun la popolo de Israelo, kun kiu Dio starigis eternan interligon. Ni scias en la kredo ke niaj hebreaj fratinoj kaj fratoj „*estas amataj (de Dio) pro la patroj. Ĉar la donacoj kaj la vokado de Dio estas nerevokeblaj!*” (Rom 11,28-29). Al ili apartenas „*la adopto kaj la gloro, kaj la interligoj, kaj la leĝdono, kaj la Diservo, kaj la promesoj; el kiuj laŭ la karno estas Kristo...*” (Rom 9,4-5).

Ni malaprobas kaj kondamnas ĉiujn manifestaciojn de antisemitismo, la „*pogromojn*”, la persekutojn. Pro la kontraŭjudismo en kristana medio ni petas al Dio la pardonon kaj al niaj hebreaj fratinoj kaj fratoj la donacon de la repaciĝo.

Urĝas kaj necesas ke oni estu koscias, en la anonco kaj en la instruo, en la doktrino kaj en la vivo de niaj Eklezioj, pri la profunda ligo kiu ekzistas inter la kristana kredo kaj hebrelismo kaj subteni la kunlaboron inter kristanoj kaj hebreoj.

NI nin devigas

- stari kontraŭ ĉiuj formoj de antisemitismo kaj kontraŭjudismo en la Eklezio kaj en la socio;

- serĉi kaj pliintensigi je ĉiuj niveloj la dialogon kun niaj hebreaj fratinoj kaj fratoj.

11. Prizorgi la rilatojn kun Islamo

Ekde jarcentoj islamanoj vivas en Eŭropo. En kelkaj landoj ili konsistigas grandan minoritaton. Pro tio, estis kaj estas multaj pozitivaj kontaktoj kaj bonaj rilatoj de najbareco inter islamanoj kaj kristanoj, sed ankaŭ, ambaŭflanke, krudaj rezervoj kaj antaŭjuĝoj, kiuj datiĝas de la dolorigaj spertoj travivitaj dum la historio kaj en la ĵusa pasinteco.

Ni volas pliintensigi je ĉiuj niveloj la renkonton inter kristanoj kaj islamanoj kaj la dialogon kristan-islaman. Ni rekomendas aparte kune mediti pri la kredo je la unika Dio kaj klarigi la komprenon pri la homaj rajtoj.

NI nin devigas

- renkonti la islamanojn per sinteno de estimo;
- kune agadi kun la islamanoj koncerne temojn el komuna intereso.

12. La renkonto kun aliaj religioj kaj konceptadoj pri la mondo

La plureco de religiaj konvinkoj, de mondkonceptoj kaj vivomanieroj fariĝis trajto kiu karakterizas la eŭropan kulturon. Disvastiĝas orientaj religioj kaj novaj religiaj komunumoj, estigante ankaŭ interesigon ĉe multaj kristanoj. Krome, ĉiam pli viroj kaj virinoj repuŝas la kristanan kredon, rilatiĝas kun ĝi per indiferenteco aŭ sekvas aliajn konceptojn pri la mondo.

Ni volas serioze konsideri la kritikajn temojn kiujn oni adresas al ni, kaj zorgi pri la starigo de lojala konfronto. Necesas ĉi-koncerne distingi la komunumojn kun kiuj oni devas serĉi dialogojn kaj renkontojn, disde tiuj fronte al kiuj, laŭ kristana vidpunkto, oni devas male esti singardaj.

NI nin devigas

- rekoni la religian kaj konscienc-liberecon de personoj kaj komunumoj, kaj igi, ke ili, unuope kaj komunume, private kaj publike, povu praktiki sian religion aŭ mondkoncepton, en la respekto de la valida juro;
- esti malfermitaj je dialogo kun ĉiuj bonavolaj homoj, strebi kun ili por komunaj celoj kaj atesti al ili la kristanan kredon.

Jesuo Kristo, Sinjoro de la Eklezio „unu”, estas nia plej granda espero de repaciĝo kaj paco.

En lia nomo ni volas daŭrigi en Eŭropo nian iradon kune. Ke Dio asistu nin per sia Sankta Spirito!

„Kaj la Dio de espero plenigu vin per ĉia ĝojo kaj paco en kredado, por ke vi abunde havu esperon, laŭ la potenco de Sankta Spirito”. (Rom 15,13)

Kiel Prezidantoj de la Konferenco de la eŭropaj Eklezioj (KEK) kaj de la Konsilio de la eŭropaj episkoparaj Konferencoj (CCEE) ni rekomendas ĉi tiun Ekumenan Ĉarton kiel bazan tekston por ĉiuj Eklezioj kaj episkoparaj Konferencoj de Eŭropo por ke ĝi estu akceptita kaj konformigita je la specifa kunteksto de ĉiu el ili.

Kun ĉi tiu rekomendo ni subskribas la Ekumenan Ĉarton, kadre de la eŭropa ekumena Renkontiĝo, kiu okazas la unuan dimanĉon post la komuna Pasko de la jaro 2001.

Strasburgo, la 22an de aprilo 2001

Metropolito Jérémie

Prezidanto de KEK (Konferenco de la eŭropaj Eklezioj)

Kard. Miloslav VLK

Prezidanto de CCEE (Konsilio de la eŭropaj episkoparaj Konferencoj)

Redaktora rimarko:

La tradukinto uzis «servadoj», kiam mi preferus uzi la vorton «oficoj», same pri «formado» resp. «trejnado», «kreaĵaro» resp. «kreo», «sociala» resp. «socia», «hebrea, hebreisimo» resp. «judo, judismo» (itala tradukinto).

NOVA TRADUKO DE WILLIAM AULD

Usona verkisto James Branch CABELL (1879–1958) publikigis pli ol 50 romanojn, kaj «*Jurgen*» (1919) estas la plej konata el ili. Ĝian sukceson akcelis tio, ke en Novjorka juĝejo ĝi estis akuzita pri maldeco kaj obsceno. Sed ne serĉu tiujn en la libro!..

Jurgen estas lombardisto en imagita lando, iama poeto, kiu regajnas sian juncon, retenante la saĝon kaj sperton de sia matura aĝo. Serĉante sian forŝiritan edzinon, Jurgen travojaĝas fantaziajn kaj legendajn teritoriojn, inkluzive de la kristanaj Infero kaj Paradizo, prosperante ĉe belaj virinoj (ekzemple, Helena de Trojo) kaj ĉiam plialtiĝante range, ĝis fine li renkontas la ĉiel-potencan Koŝĉej (kiu «faris ĉiujn aferojn tiajn, kiajn ili estas») kaj petas, kun interesaj sekvoj, redonon de la edzino.

Interalie, «*Jurgen*» estas la plej ŝatata libro de William AULD, kiu majstre tradukis la majstroverkon de CABELL. «*Sezonoj*» (Ruslando) eldonis ĝin kiel la dekan volumon en la serio «*Mondliteraturo*».

La 240-paĝa fortike bindita libro estas

mendebla kontraŭ 18 euroj ĉe UEA, FEL, ELNA kaj aliaj gravaj libroservoj, ankaŭ rekte ĉe la eldonejo poŝte aŭ rete <sezonoj@mail.ru>.

TRANS LA SPEGULO

La Esperanta traduko de «*Alico en Mirlando*» de Lewis CARROLL, eldonita en aŭgusto 1999 estis elĉerpita jam fine de 2000. En junio 2001 «*Sezonoj*» eldonis la duan libron de CARROLL pri Alico — «*Trans la Spegulo kaj kion Alico trovis tie*». Same kiel la unuan libron pri Alico ĝin tradukis Donald BROADRIBB.

«*Trans la Spegulo*» aperis kiel la 11-a volumo en la populara libroserio «*Mondliteraturo*». La libro havas belan plenkoloran kovrilon de Maŝa BAJĜENOVA kaj ilustraĵojn de John TENNIEL interne.

La 128-paĝa libro estas mendebla ĉe la eldonejo poŝte aŭ rete:

<sezonoj@mail.ru> kontraŭ 9 euroj.

Cetere, «*Trans la Spegulo*» markas etan jubileon; ĝi estas la 75-a libro, kune eldonita de Halina GORECKA kaj Aleksander KORĜENKOV.

Halina GORECKA

Adorare amantis est

ENKONDUKO AL LA NOVA KANT— KAJ DISERV— LIBRO ADORU

Al mi, kiu jam frue konatiĝis kun la riĉa himnaro el la multjarecenta trezorejo de la katolika eklezio, tre plaĉas la majstra, germanlingva studo, verkita de la benita benediktano Aemiliana LÖHR «*Abend und Morgen. Ein Tag*», Regensburg 1954. Ĝi donas belan kaj profundan ekzegezon pri la himnoj de la roma breviero. La ruĝkolora kovrilo klare atestas kaj mesaĝas: *Cantare amantis est* (Kanti estas afero de amanto).

Enkondukcele ni povus iom ŝanĝi la tekston, dirante: «*Adorare amantis est*».

Karakterizas la amantan homon ke ŝi aŭ li ŝatas adori. Kristanaj esperantistoj, kiuj dum jaroj utiligis la juvelon *Adoru Kantante*, sekve konfesas sin «Di-amantaj» kristanoj.

La latina kunmetita verbo *ad-orare* signifas: petante alvoki, adori, honori, k.s.

Sed oni ĝin uzis ankaŭ por, tute laŭ orienta kutimo, respektive saluti princon. Oni tiam gvidis la dekstran manon al la buŝo, klinante la korpon antaŭen. La simpla verbo *orare* havas plurajn signifojn — ekz. paroli, diri, pledi, oratori, peti, demandi, preĝi — en kiuj instrumente ĉefrolas la homa buŝo (*os, oris*).

Sed mi lasu la iamtempan Esperanton, sufiĉe disvastigitan en la Mezepoko, por plene ĝui kaj ĝuigi «la bonan lingvon», kiun D-ro L.L. ZAMENHOF donacis al ni, nelaste por kantado.

Homo privilegiita mi nomas min, ĉar du tagojn de la semajno mi «sabatias»



sub la tegmento de benediktana monaĥejo. Ĉiunokte, kvaronon post la kvina, la monaĥoj vekigis por pretigi sin por matena preĝoro. Ili kolektiĝas ĉirkaŭ la abato, kaj unu el ili levas la voĉon, ekkantante:

— «Plejaltulo, apertu miajn lipojn, kaj mia buŝo anoncos vian laŭdon. Plenigas mian buŝon laŭdo al Vi: la tutan tagon regu Via gloro!»

Grave estas kompreni ĉi tie, ke la komencon de la laŭdo—tago iniciatas ne homoj, sed la Ĉielo.. Se la bona Dio ne malfermus niajn lipojn, kanti ni ne kapablus. Kaj se La Nevidebla Vidanto pere de la psalmoj ne flustrus al ni la plej ĝustajn laŭdo—vortojn, ech balbuti ni ne povus! La benediktanoj, kies vivo fariĝu unu seninterrompa laŭdado kaj glorado, tradicie vivas laŭ «Preĝu—kaj—laboru»—skemo, sed sciendas, ke ankaŭ ilia preĝado nomiĝas laboro, t.e. *Opus Dei*.

«*Adoru Kantante*», sinsekve aperintaj kajeroj «*Tero kaj Ĉielo Kantu*», kantlibro, «*Ni vivu laŭeble plej bele*» kaj torento da apartaj kajeroj kaj kantfolioj en la daŭro de la jardekoj pasintaj ekfariĝis pli kaj pli parto de nia dokumentujo (faklingve: «dua haŭto») dum

kongresaj kaj aliaj aranĝoj esperantistaj. Sed jam venis la momento zorge selekti kaj arigi ilin por nova kantararo principe ekumena kaj adaptita al ĉi-tempuloj, en kiu adekvate esprimiĝas niaj sentoj kaj pensoj, deziroj kaj bezonoj, timoj, atendoj kaj esperoj. Ŝanĝiĝas la monda kunteksto, en kiu ni vivas kaj spiras, kaj ni, modernaj homoj, aliĝas kune kun ĝi.

Kelkaj iniciatemaj, kuraĝaj kaj entreprenemaj talentuloj el niaj vicoj faris multege da laboro. Pri tio mi nun ne detale parolu, ĉar mallonga antaŭparolo tion ne permesus. Estu certaj pri tio, ke almenaŭ triopo da sindediĉaj, konsciencinter si dialogantaj — dankindaj kaj dankendaj — aŭtoroj streĉis ĉiujn siajn fortojn por enmanigi al ni kvalitan kaj juvelan kantararon. Ĝin la unuan fojon ni uzos kadre de la 15-a Ekumena Kongreso, en 2001 okazonta en la kroata ĉefurbo Zagreb. Kaj la kongresa temo memkompreneblas: «*ADORU*». Mi ĝojus, se kristanoj divers-ekleziaj sed samideanaj trovas en la nova kantararo ĉion por nutri sin en medioj, en kiuj ili uzas la internacian lingvon. Varme mi ĝin rekomendas!

El la Libro de Libroj leviĝas la invita, eĉ imperativa alvoko «ade preĝi». Ke dum ĉiuspecaj kunvenoj la veraj Diamantoj ne nur **ade** preĝu, sed ankaŭ **duoble**, t.e. ĥore kantante, plurvoĉe adorante!

Heemskerck,
la 14-an de februaro 2001
Jacques TUINDER
prezidanto de KELI

ADORU

Kristana kantlibro en Esperanto kun la titolo *ADORU* aperos la 16-an de junio 2001, produktita en la presejo de la renoma eldonejo Herder en Freiburg, Brisgovio (Germanio).

Temas pri evento komparebla kun la apero de Esperanto-tradukoj de la Sankta Biblio en 1926 kaj la Roma Meslibro en 1995.

Ĝi enhavas liturgiajn tekstojn el diversaj tradicioj, rom-katolika, ortodoksa kaj reformacia. Pli ol 900 kantoj (kun muziknotoj) el pli ol 20 lingvoj spegulas la tradicion de almenaŭ dek konfesioj. Por havi modernajn kantojn necesas elspezi grandajn sumojn por akiri kopi-rajtojn por represi muzikon kaj fari tradukojn.

Por Diservoj okaze de Esperanto-kongresoj ĝi estos grava helpo, sed ankaŭ por persona uzo. Kiel literatura verko poezia, *ADORU* varbas por la intereso ankaŭ de esperantistoj ekster la kristana medio.

Redaktis la tuton la pastroj Adolf BURKHARDT (evangeliana) kaj Albrecht KRONENBERGER (katolika). Gitarajn akordojn reviziis kaj komponis renoma fakulo, eklezia muzik-direktoro Ernst LEUZE.

Per via mendo vi helpas financi la kostojn, ĝis nun kovritajn de donacoj kaj pruntoj.

La verko, sur plej alta profesia nivelo, tre taŭgas varbo-cele por demonstri al kristanoj kaj eklezianoj, ke Esperanto vivas ankaŭ en la eklezioj kaj utilas por interpopola kaj interkonfesia kompreniĝo.

La libro kostos 19,80 EUR (luksa eldono kun identa enhavo, sed leda bindo kaj orumita tranĉ-rando kostas

NASKIĜIS KOMUNUMO DE BONVOLAJ HOMOJ

(prediko de Éva FARKAS-TATAR okaze de la solena akto de la promulgado de la Ĉarto de Sabloneto)

Karaj gefratoj,

Permesu ke mi salutu vin kiel Jesuo Kristo salutis siajn disĉiplojn: Paco al vi!

Multaj el vi certe scias ke hodiaŭ estas la festo de Pentekosto, la festo de la Sankta Spirito. En la kristana mondo oni festas hodiaŭ tiun feston.

Kion signifas tio, kiam la Sankta Spirito aperis foje en Jerusalemo? Aperis iu nevidebla dia forto kiu la timemajn, sin kaŝintajn apostolojn kuraĝigis, lumigis antaŭ ili tiujn mirindajn novaĵojn, kiujn Jesuo Kristo instruis al ili jam de tri jaroj; sed ili ne kuraĝis tion plu doni, pri tio paroli. Kaj la Sankta Spirito tiel fortigis ilin ke ili kuraĝe iris, kaj antaŭ la amaso da pilgrimantoj, kiuj tiutempe svarmis sur la stratoj de Jerusalemo, komencis paroli pri la bona novaĵo de Jesuo Kristo.

Tiu bona novaĵo, ni povus tre simple tiel resumi, estis ke Dio ne estas tia,

48 EUR) kaj estas mendebla ĉe la libro-servoj aŭ rekte ĉe pastro Bernhard EICHKORN, kiu motoris kaj kunordigis la projekton (Romäusring 20, DE-78050 VS Villingen Tel. 0/7721-22073, Fax 0/77221-22074 <Bernhard.Eichkorn@esperanto.de>

En Stuttgart okazos Ekumena Diservodu-lingva kun invito al la publiko, en Katharinen-Kirche (Prakatolika Preĝejo), Olga-Str. je 23a de junio, 16h, kun partopreno de la aŭtoroj, pastroj BURKHARDT, EICHKORN, KRONENBERGER.

ne estas duvizaĝa, ne havas unuflanke patran, bonan, ridetantan vizaĝon kaj aliflanke koleran, vengeman: do tio ne eblas. Jesuo tion instruis, ke ni havas en la Ĉielo patron. Eĉ kiam Jesuo alparolis tiun patron, en siaj preĝoj (la Biblio konservis tiun antikvan araman vorton) Li diris «abba», kiu signifas «paĉjon». Tiel Li alparolis Dion kaj al tio li kuraĝigis ankaŭ la homojn: ne timu Dion, sed fidu kaj venu al Li kaj vidu ke Li estas bonkora. Kaj la alia grava instruo de Jesuo: ankaŭ la homo ne estas tia, ne estas kiel vermo, ne estas nur heredanto de la pekoj, do pekemulo, sed ĉiu homo havas en si iun fajrereton dian kiu estas alparolebla. Kaj malantaŭ la miraklaj resanigoj de Jesuo Kristo ĉiam ni trovas ke Li vidis tiun dian fajrereton en ĉiu homo. Tiel li povis vivi tiun etan dian fajrereton en ĉiu kiu proksimiĝis al Li.

Do tiun miraklon komencis kuraĝe disvastigi la apostoloj, antaŭe timemaj kaj malkuraĝaj, kaj tiel tiu ĉi tago estas la naskiĝtago de la eklezio, la sekvantoj de Jesuo Kristo. Sed la Sankta Spirito ne estas ligita al la eklezio. La eklezio, la amaso da kredantoj, jes estas ligita al la Sankta Spirito, ĉar sen la instruoj, sen la forto, sen la lumo de la Sankta Spirito la bibliaj vortoj estas nur vortoj, por la kapo. Sed nur se la Sankta Spirito helpas al ni, al la legantoj, same kiel helpis al tiuj kiuj skribis tiujn atestojn pri la diaj travivaĵoj, nur tiam ni povas kompreni kiu estas ĝia mesaĝo. Sed la Sankta Spirito ne estas ligita al iu ajn institucio: la Dia Spirito estas libera, aperas ĉie kie oni vidas homfraton en la alia homo, kie oni vidas la dia fajrereton en la proksimulo, en tiuj kiuj bezonas nian helpon. Tio signifas ke la Sankta Spirito laboras en la tuta mondo: kie naskiĝas iu bona ideo, kie naskiĝas iu

helpemo, sinofero, tie la Sankta Spirito funkciis.

Vi scias ke de Zamenhof ni heredis ne nur lingvon praktikan, sed ankaŭ ideon, iun vere noblan kaj belan ideon, kiu bedaŭrinde en kelkaj jardekoj ŝajnis malaperi. Oni ĉiam emfazis nur la praktikan utilecon de esperanto kaj volis kaŝi tiun idealon kiun Zamenhof volis alligi al la lingvo. Sed ĉiam estis homoj kiuj provis sekvi lin ne nur en la gramatiko, sed ankaŭ en la spirita sinteno. Kaj por mi estas vere mirinda fenomeno ke ĝuste hieraŭ, tuj antaŭ Pentekosto, naskiĝis iu nova, mi ne scias ĉu mi rajtas jam diri, organizo, aŭ movado, aŭ komunumo de bonvolaj homoj: la Esperanta Civito.

Kaj mi esperas ke tiu Sankta Spirito, kiu eble ankaŭ ne en la sama nomo, sed per la sama bona volo kaj transforma kaj viviga forto vi proksimiĝas al tiu ĉi dia forto. Mi mem venas el la reformita eklezio el Hungario, por mi la Biblio estas sankta libro, kvankam mi scias ke sen la lumigo de la Sankta Spirito ĝi estas nur kolektaĵo de vortoj. Ne estas dia forto, sen la Dia Spirito en ĝi. Sed mi bone scias ke estas ankaŭ aliaj sanktaj libroj, kaj estas ankaŭ aliaj estimindaj vojoj sur kiuj homoj volas proksimiĝi al la Eternulo, kiun ili honoras kaj kies forton ili volas uzi por la bono de aliaj homoj.

Do mi pensas ke la Esperanta Civito povas kolekti tiujn homojn, kiuj estas bonintencaj, kiuj povas ankaŭ kuraĝe ekparoli kiam ili devas apogi iun, kiuj povas ekvidi ankaŭ en la plej etaj komencoj tiun forton kiu povas kreski kaj vere feliĉigi la homaron. Ni esperu en la helpo kaj beno de Dio.

Amen.

Éva FARKAS-TATAR
(Interredaktore)

NOVA BIBLIO POR BRAZILANOJ

La Internacia Biblio-Societo anoncis la aperon de nova portugallingva traduko de la Biblio por Brazilo. Temas pri la longe atendita «*Nova Versão Internacional*» (Nova Internacia Versio), kiun oni oficiale prezentis al la legantoj dum publika ceremonio en marto. La traduko en la portugalan el la originalaj bibliaj lingvoj aparte celas al la junularo, ĉar pli ol 50 procento de la 172 milionaj brazilanoj estas sub la aĝo de 20 jaroj.

Multaj brazilanoj ankoraŭ uzas la tiel nomitan Almeida-tradukon, kiun faris portugala misiisto al Indonezio en la 17a jarcento. Unue eldonita en 1681, ĝi estis jam plurfoje reviziita. Spite al tio, multaj evangelikoj en Brazilo spertis la bezonon havi tute novan modernan tradukon por homoj, kies gepatra lingvo estas la portugala, kiu kun pli ol 200 milionoj da parolantoj estas la sesa plej granda lingvo-komunumo de la mondo. Oni komencis la tradukadon en 1990; jam en 1994 aperis la Nova Testamento en la nova traduko.

La Internacia Biblio-Societo, kies ĉefsidejo estas en Usono, jam subtenis la tradukon de similaj modernlingvaj Biblio en la angla (*New International Version*) kaj la hispana (*Nueva Versión Internacional*).

Internacia Biblio-Societo: <http://www.gospelcom.net/ibs/>

Jerald VEIT

NOVA MONATA BULTENO «KRISTANA ESPERO» ENHAVAS BIBLIAJN TEKSTOJN

Karaj gefratoj en Kristo!

Mi volas prezenti al vi la novan bultenon «Kristana Espero». Ekde aprilo 2001 ĝi aperas monate. La enhavo precipe estas mallongaj tekstoj el la Biblio por ĉiu tago de la monato. Similan servon mi jam donas interrete(1) kaj pere de retposto(2), sed mi ne volis preterlasi tiujn, kiuj ne posedas komputilon aŭ kiuj ne havas aliron al la «reto».

Unue mi intencis aperigi la bultenon kiel aldona serveto por usonaj KELI-membroj (mi estas la novbakita usona peranto por KELI). Sed ĉar la KELI-anonj en Usono estas tre malmultaj, nun mi volas proponi la bultenon ankaŭ al ĉiuj membroj de KELI, kaj fakte al ĉiuj interesitaj personoj, kie ajn ili estas tra la mondo.

Mi do proponas senpagan abonon al «Kristana Espero» ĝis la fino de la nuna jaro. Decembre de 2001 mi denove pripensas, ĉu daŭrigi la aferon aŭ ne, depende de la rezultoj kaj la reago de la legantoj.

Mi volonte sendos provnumeron per aerpoŝto al ĉiuj petantoj. Mi dankas vin pro via intereso kaj deziras al vi ĉiujn benojn de Dio!

Amike kaj frate via

Jerald VEIT

Petu provnumeron aŭ jarabonon de la nova «Kristana Espero» de:

Jerald VEIT

3578 S. Taylor Avenue
Milwaukee, WI 53207 Usono
Rete: jveit@execpc.com

(1) <http://www.execpc.com/~jveit/>

(2) <http://groups.yahoo.com/group/365tagojellabiblio/>

Ree pri la maŭnacioj ĉirkaŭ profesoro DEN HEYER

[vidu en *Dia Regno* de majo-junio 2000, p. 6-7 + sept-okt 2000, p.10-12 + nov-dec 2000, p.3.]

Profesoro C. J. DEN HEYER, pri kiu mi mallonge raportis jam pli frue, komence de 2001 komplete retiris sin de sia profesora laboro; pro sia sanstato, li estis devigita pli frue pensiigi, ĉar ĉiujn diskutadojn ĉirkaŭ sia persono li ne plu eltenis. Li pli frue jam ankaŭ rezignis pri sia klopodado fariĝi 'pastoro en ĝenerala servado'.

Laŭ mi: terura, persona tragedio por tre sincera homo! Iom pli juna ol mi, kiom mi scias, kaj komplete senenergiigita! En aprilo la reformita sinodo denove diskutadis kaj voĉdonis pri li kaj liaj opinioj. Ekzistas daŭre fortega opozicio, kiu per ĉiuj rimedoj serĉas kondamni lin kvazaŭ herezulon, kvankam kion li faris, estas nur tre zorge ekzegeze analizi la tekstojn de l' novtestamentaj evangelioj plus la leteroj de Paŭlo koncerne tion, kion tiuj ja efektive instruas pri Jesuo Mesio — kontrastante tion kun la pliposta teologia tradicio ortodokse-protestanta. Sed, ŝajnas, ke por pluraj teologoj la dogmoj pli gravas ol la N.T. mem.

Tre ĉagrene,

Gerrit BERVELING

Solve de la silaba krucvortenlĝmo (827)

horizontale: 1. divena, 4. dukato, 7. liturgio, 9. muso, 10. kolo, 11. daŭre, 12. monotipo, 14. kimono, 15. nomado.

vertikale: 2. veli, 3. naturkono, 4. duo, 5. toleremo, 6. komuniki, 8. gilotino, 12. mono, 13. poma.

kromsolvo: monato.

Se vi iam foliumis la Unuan lernolibron de d-ro Esperanto, vi certe rimarkis en ĝi kuponojn kun la teksto:

«Mi, subskribita, promesas ellerni la lingvon internacian, se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tian saman promeson».

Kiel estas konate, oni neniam publikigis la rezultojn de tiu 'promes-kampanjo', sed supozinde la kvanto de la promesintoj apenaŭ havus ŝancon atingi 10 000 000, ĉar la eldonkvanto de la Unua Libro estis nur kelkaj miloj.

Surbaze de tiu Zamenhofa demando REU-aktivuloj en la dua duono de majo okazigis surstratan enketadon, en kiu estis ankaŭ demando pri kondiĉoj, dezirataj por oni eklernu la lingvon. Ni tamen rekalkulis, ke 10 milionoj de 1887 proksimume ekivalentas al 50 nuntempaj milionoj.

Kaj jen la ĉefa rezulto: 37,1% da respondintoj pretus studi Esperanton jam nun aŭ se ĝin parolus 50 milionoj en la tuta mondo!

La enketado okazis en 7 rusiaj urboj: Kazan, Volgograd, Irkutsk, Vladivostok, Ivanovo, Kostroma kaj Ĉeboksary. Sume estis pridemanditaj 784 personoj.

La unua demando en la listo estis «Ĉu vi scias, kio estas Esperanto?» Al tiu demando pozitive kaj korekte respondis averaĝe 43,9% da respondintoj. La cifero mem sufiĉe variis de urbo al urbo: de 24,7% en Volgograd ĝis 51,2% en Ivanovo.*

* En Ĉeboksary pri Esperanto sciis 59,5% da respondintoj — sed entute estis pridemanditaj nur 37 personoj. En Vladivostok sciis 92,9% (el 56 demanditoj) — tamen ili ĉiuj estas studentoj de Vladivostoka universitato, kie oni i.a. instruas Esperanton.

La dua — «Zamenhofa» demando enhavis eblecon elekti la kondiĉojn ĉe kiuj oni pretus ekstudi la lingvon:

a) «se mi sciis kie kaj kiam mi povas lerni Esperanton» — tiun kondiĉon elektis 25,1%

b) «se Esperanto estus parolata de 50 milionoj da homoj en la tuta mondo» — 12%

c) «se Esperanton parolus la tuta mondo» (ni konsideris tion negativa respondo) — 31,3%

ĉ) ne volus lerni (aŭ havis aliajn malfacile plenumoblajn kondiĉojn) — 31,6%

Aliaj interesaĵoj:

— plejparto de la respondintoj estis studentoj (en kelkaj urboj — nur studentoj), iom pli ofte — ineksaj (ne ĉiuj urboj prezentis pri tio statistikojn). I.a. tiel okazis, ĉar mem la enketintoj estas tiaj. Sed statistikaĵoj pri la urboj, kie oni pridemandis ne nur studentojn montras, ke sufiĉa intereso pri Esperanto ekzistas ankaŭ en aliaj grupoj de la loĝantaro.

— En Ivanovo enketantojn renkontis tri personoj (nekonataj), kiuj kapablis paroli Esperanton (entute en Ivanovo estis pridemanditaj 166 personoj). Bona procentaĵo!

— Estis multaj amuzaj respondoj pri tio, kio estas Esperanto, kiam respondintoj fakte ne sciis: iuj pensis, ke tio estas danco, poezia mezuro, pozicio de Kama-Sutra, stratnomo (en Kazanĵ, kie vere estas tianoma strato) ktp.

Sed revenu ni al la Zamenhofa demando: ĉu troviĝus en la nuna mondo 50 milionoj da personoj, kiuj promesus lerni Esperanton, se montriĝus, ke tian saman promeson donis tioma kvanta da homoj?

Mi kredas, ke jes. Ja nur en Rusio

ESPERANTO-ARANĜOJ EN ĈERVAR-PORAT (NORDA ADRIATIKO) PROGRAMO POR JARO 2001

1. SEMINARIOJ

Seminario «L. L. Zamenhof ESPERANTO — HILELISMO — HOMARANISMO» (02.09-09.09), gvidos Jeremi Gishron (IL) aŭ Mato Ŝpekuljak (HR).

Seminario «Leono Tolstoj LA VOJO DE LA VIVO» (09.09-16.09), gvidos Andrej BOCHKAREV (RUS) au Mato ŜPEKULJAK (HR).

kvarono de la t.n. aktiva loĝantaro pretas doni tian promeson aŭ eĉ tuj ekstudi la lingvon. La loĝantaro de Rusio en 2000 jaro konsistigis 146 739 413 personojn, el kiuj en la aĝo 14-30 jaroj estas 17 604 470 personoj. Se ni akceptos, ke la ricevitaĵaj statistikaj donitaĵoj respegulas la realan staton, ni povas kalkuli, ke eĉ en unusola Rusio la promeson donus ĉ. 4,5 milionoj da gejunuloj kaj eble ne malpli da homoj el aliaj aĝkategorioj. Kaj ĉiuj rusianoj konsistigas nur ĉ. 2,5% da la monda loĝantaro.

Dankegon al ĉiuj, kiuj kunlaboris, speciale al la lokaj kunordigintoj Eŭĝeno DELCOV (Irkutsk), Edik KOLOSOV (Volgograd), Aleksej KUZNECOV (Kostroma), Aleksandr GALKIN (Kazanĵ), Aleksandr TITAEV (Vladivostok), Danil KAPITONOV (Ĉeboksary), Natalja GRIGORJEVSKAJA (Ivanovo) kaj iliaj teamanoj!

Sincere via,
Andrej GRIGORJEVSKIJ
Interredaktore
fonto: ret-info
<http://www.eventoj.hu>

La seminariojn organizas Hilelista rondo. Partopreni la seminariojn estas invitataj ĉiuj esperantistoj intresigantaj pri etikaj temoj. Por partopreni seminariojn sufiĉas meznivela regado per Esperanto. Seminarioj konsistos el po du ĉiutagaj (de lundo ĝis vendredo) prelegoj kun diskutoj (antaŭtagmeze, de 09.00 ĝis 10.30 kaj de 11.00 ĝis 12.30). Posttagmezo estos libera por promenado, sunumado, naĝado, biciklado, ekskursado... Ne estas iu ajn kotizo por partoprenado en la seminario. Pri la seminarejo estos decidite depende de la nombro de aliĝintaj esperantistoj. Restado, en Ĉervar-Porat aŭ ĝia ĉirkaŭaĵo, laŭ persona prefero. Aranĝi individue aŭ grupe konvenan — kaj kiel eble malpli multekostan — loĝadon kaj manĝadon povas helpi la pormomenta kunordiganto de Hilelista rondo. Oni povas antaŭkalkuli kun jenaj restadelspezoj por unu persono: por loĝado ek de ĉirkaŭ 10 EUR + por manĝado ek de ĉirkaŭ 6 EUR. Ne estas limigita nombro de partoprenantoj. Por po 2 membroj de Hilelista rondo/asocio eblos senpaga loĝado en Ĉervar-Porata apartamenteto de la pormomenta kunordiganto de Hilelista rondo, kaj komuna kun li uzado de kuirejeto por mempreparado de manĝaĵoj. La lasta dato por aliĝi estas la 1-a de aŭgusto 2001. Prioritaton por la senpaga loĝado havas pli aktivaj membroj de Hilelista rondo el urboj/regionoj kun pli da membroj kaj simpatiantoj de Hilelista rondo. Se la senpagan restadon petos pli ol maksimume akcepteblaj po 2

personoj, la pormomenta kunordiganto decidis kies peto estos akceptita, kaj pri sia decido li sciigos ĉiujn petantojn ĝis la 15-a de aŭgusto 2001.

2. UNUSEMAJNAJ SOMERUMADOJ

Unusemajna somerumado (01-08.07)
DEFINITIVE REZERVITA

Unusemajna somerumado
(08-15.07)

Unusemajna senpaga somerumado
(26.08-02.09)

Je dispono de gastoj (prioritaton havas membroj aŭ simpatiantoj de Hilelista rondo/societo kaj precipe tiuj kiuj estas en la rondo pli aktivaj kaj/aŭ kiuj vivas en urboj/regionoj kun pli da membroj kaj simpatiantoj) dum po unu semajno estos la Ĉervar-Porata apartamenteto de la pormomenta kunordiganto de Hilelista rondo. En la apartamenteto estas 1 ĉambro (kun 2 litoj por po 1 persono kaj kun 1 duŝeĝolito taŭga por 2 personoj), kuirejeto por mempreparado de manĝaĵoj, duŝejo kun necesejo. En la apartamenteto (entute 25 kvadratmetra) estas elektra fornoplato, fridujo, 2 bicikloj. La apartamenteto havas loĝion. Por la julia uzado de la apartamenteto kaj ĝia havaĵo oni devas pagi al la pormomenta kunordiganto po 6 EUR por unu persono por unu tago, kiel kontribuo por la 1-a Hilelista renkontiĝo. La finaŭgusta uzado estas senpaga kaj komuna kun la pormomenta kunordiganto. Pri la manĝado gastoj zorgas mem (en la apartamentaro estas kelkaj bone provizitaj vendejoj, malfermitaj ĉiutage kaj tuttage, fiŝrestoracio, kafejoj...). En la apartamentaro estas poŝtoŝtanco kaj kuracisto. La restado de gastoj devas esti lauleĝe registrita kaj gastoj devas

Laste aperis...

Zofia Banet-Fornalowa: *ANTONI GRABOWSKI – eminenta Esperanto-aganto*. Riĉe dokumentita kaj ilustrita biografio de tiu konata esperantisto de la unua periodo de E-movado, vaste konata kiel „Patro de Esperanto-poezio”. Krom kerna teksto de la aŭtorino, konata historiistino de la E-movado, indekso de personoj kaj bibliografio, la libro enhavas la parton *Artikoloj, fotoj kaj aliaj dokumentoj*, kiu riĉigas la biografion, kaj donas la impreson de sciencia prilaboro de la temo. Ĉio ĉi omaĝe al Antoni Grabowski, kies 80-mortodatreveno pasas ĉi-jare.

La libron eldonis Eldonejo HEJME (kiu eldonas ankaŭ nian revuon), en kiu oni povas la libron mendi.

ANTONI GRABOWSKI – eminenta Esperanto-aganto, ISBN 83-907637-2-9, formato A-5, 140 pĝ, 12 EUR.

pagadi lokan turisman restadimposton (po ĉirkaŭ 1 EUR por ĉiu tago kaj por ĉiu persono). La lasta dato por antaŭrezervado estas la 1-a de junio. Se la restadon petos pli da personoj ol estas maksimume akcepteblaj, la pormomenta kunordiganto decidis kies peto estos akceptita, kaj pri la decido sciigos ĉiujn petantojn ĝis la 15-a de junio.

Aldonajn demandojn, aliĝojn al la seminarioj kaj antaŭrezervadojn de la somerumado bonvolu sendi al la pormomenta kunordiganto de Hilelista rondo Mato ŜPEKULJAK (Oštarijska 8, HR-10000 ZAGREB, Kroatio; rete: hilelistarondo@yahoo.com).

Nova muzika kompaktdisko

Jus naskiĝis en Dordonjo en la lulilo de la grupo Esperanto 24 kompaktdisko kies patro Thierry FAVERIAL jam konigis sin de SAT kongresanoj en Limoges (97) kaj UEA en Montpellier (98).

Tie li montris sian talenton kantante kaj gitarludante dum la spektakloj «*La Komuno*» kal «*La velado*» prezentitaj de «*la Kompanoj*».

Post sia partopreno en komuna bebo, t.e. la KD «*Survoje*» de la bordoza grupo «*la Kompanoj*», aperinta en la kolekto 2000 de Vinilkosmo, Thierry FAVERIAL revenas soliste kun «*Duone*», en kiu li rolas kiel komponisto, muzikisto, kantisto kaj aŭtoro de kelkaj tekstoj, por prezenti 10 kanzonojn, kies plej granda parto estas originala.

«*Duone*» per sia melodia riĉeco, miksas la spicajn saporojn de intimeca latinjazo kun diversaj ritmoj de la eŭropa kanzonaro. Ĉiu el la titoloj estas invito al vojaĝo, en aparta etoso, kiu foje kondukas al revemo aŭ dramo, foje al voluptemo aŭ poezio.

Thierry nun produktas verkon de muzikisto, lasanta longajn sonajn periodojn por la ventinstrumentoj, tie kie la muziknotoj esprimas tion kion la vortoj ne ĉiam fidele povas diri. Oni mergiĝas en gitara kaj saksofona universo, asociita kun tekstoj ofte esprimplenaj (dankon al la amiko Marcelo REDOULEZ), foje pli malpezaj, universo el kiu oni ne eliras sen emocio.

Ne nur duone la KD «*Duone*» tuŝos vin, vi estos tute ĉarmata kaj vi povas mendi ĝin ĉe

Esperanto 24
22b rue Charnay Frachet
24000 Périgueux
Francio

Konkurso pri Esperanto en radio.

Kiel ni jam informis antaŭ kelkaj semajnoj la Ĉefa Estraro de PEA kune kun radio “FAN” organizis la konkurson pri Esperanto. Post dusemajna konkurso restis kvar personoj kiuj en la finalo batalis por valoraj premioj (inter alie senpaga partopreno en Esperanto-kurso kaj moderna radioricevilo). Oni devas substreki ke la finalanoj estis bone preparitaj kaj ege atente aŭskultis dum la pasintaj semajnoj la konkurson. Dum tri semajnoj ĉiutage en la radio multfoje estis ripetata la vortoj „Esperanto” kaj „Pola Esperanto-Asocio” dum la informoj pri la konkurso. Iom da homoj reagis al la konkurso, kvankam ne multaj deklaris partopreni la kursojn de Esperanto. Interesa estas ankaŭ la fakto ke finalan disaŭdigon aŭskultis estraranoj de PEA, kiuj kunsidis ĝuste en tiu sabato en Gliwice. Plena konkurso estas surbendigita kaj povas esti uzata kiel helpilo dum diversaj kunvenoj kaj kiel instrumaterialo.

Se vi volus danki al kunorganizantoj bonvolu skribi al: fan@knurow.com.pl

Tel: 05 53 08 60 08

<http://www.esperanto.fr.st/>

Publika prezo de la KD: 100FF aŭ 15,24 eŭroj plus sendokostoj 20FF por Francio kaj Eŭropa Unio (rabatoj estas konsentitaj laŭ kvanto, kontaktu nin).

Esperante ke la sonoj de «*Duone*» baldaŭ ŝvebos en via rondo.

Vi povas aŭskulti parton de la kanzonoj en RealMedia formato ĉe nia TTTejo rubriko NOVA. Amike al vi

Esperanto 24

Esperantista projekto en neesperantista simpozio

La ĵurnalistoj diras: Ne estas novaĵo, ke hundo mordis homon, sed se homo mordis hundon — jen novaĵo.

Kion dirus esperantujaj ĵurnalistoj se la esperantista projekto «Interkulturo» prezentigas en neesperantista simpozio pri informadika teknologio en edukado en la 21-a jarcento — ĉu ĝi estas novaĵo? Se eble, mi voĉdonus ke ĝi ne estu novaĵo, sed mi timas ke ni bezonos multan tempon ĝis ĝi fariĝos kutimaĵo. Kiam io tia ĉesos esti novaĵo, tio signifos ke esperanto sukcesas en la sciencaj rondoj. Se ĝi tamen jam nun ne estus novaĵo en Esperantujo, tio signifus ke esperantistoj ne deziras esperanton sukcesanta en la sciencaj rondoj eksteresperantujaj.

Nu, jen la novaĵo: En la ĵus finita internacia simpozio «*Teknologio kaj informadiko en edukado — defio de la 21-a jarcento*», okazinta en Beograd organizite de la tiea Instituto por Pedagogiaj Esploroj, la projekto de ILEI/UEA «Interkulturo» kun sia **Kvazaŭlernejo** (virtuala lernejo) «Tibor Sekelj» estis prezentita kiel teoriaspekte riĉa praktika ekzemplo por la simpozia traktado pri didaktikaj kaj teknikaj aspektoj de aplikado de informadika teknologio en edukado, precipe en la kunteksto de multkultura edukado, plurlingvismo kaj apogo al la kulturo de paco. La prian traktaĵon subskribis Mauro LA TORRE, la ĉefaŭtoro kaj gvidanto de la projekto, kaj Radojica PETROVIĆ, komunikinto de la traktaĵo. Tute hazarde (aŭ Alaho ne rekonas hazardon, kiel dirus Renato), la sesion, en kiu tio okazis, prezidis konsilanto en la Ministerio pri edukado de Serbio kiu, poste montriĝis, lernis kiel

Baltaj Esperanto-Tagoj **BET**³⁷ Kaunas 2001

INFORMILO Nr. 2

pri la 37-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj
(BET-37)

La 37-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-37) okazos la 7-15-an de julio, 2001 en universitata urbeto de Litovia Agrikultura Universitato (litove Lietuvos Žemės Ūkio Universitetas) kelkajn kilometrojn suden for de KAUNAS. Tiu loĝloko nomiĝas NOREIKIŠKĖS. La dua urbo de Litovio KAUNAS situas je 100 kilometrojn sudoriente de ĉefurbo VILNIUS.

Ĉi-jare BET-37 estas dediĉata al Eŭropa Jaro de Lingvoj.

Veno al la aranĝo la 6-an de julio, forveturo — la 15-an de julio.

Ĝis hodiaŭa tago al BET-37 aliĝis 150 personoj el 15 landoj. Aliĝoj ankoraŭ venas. Ni antaŭvidas ĉirkaŭ 300 partoprenantojn de BET-37.

BONVENON AL KAUNAS!

Organiza komitato
(28.05.2001)

mezlernejano esperanton el lernolibro de Tibor SEKELJ kaj plu simpatias ĝin.

Informas
Radojica PETROVIĆ

Mesaĝo dissendita de E-INS = Esperanto-Instruado
Informoj ĉe: <http://ips.uniroma3.it/eins>

AL LA ROMANOJ*

(nova traduko de Gerrit BERVELING)

aŭtoro, adresitoj, saluto

1: 1 Paŭlo, sklavo de Mesio Jesuo, vokita apostolo kaj destinita por la <servo de l'> bona mesaĝo, 2 kiun Dio anoncis siatempe per Siaj profetoj en la sanktaj Skriboj. 3 <Tiu bona mesaĝo temas> pri Lia filo, kiu laŭkorpe naskiĝis el la gento de David 4 kaj laŭ la sankta Spirito estis indikita kiel filo de Dio en potenco per la releviĝo el la mortintoj: Jesuo Mesio nia Sinjoro. 5 Per li ni ricevis la gracon kaj la apostolecon, por je lia nomo konduki homojn el ĉiuj popoloj al la obo de la fido. 6 Ankaŭ vi apartenas al ili, vokitoj de Jesuo Mesio. 7 Al vi ĉiuj, amatoj de Dio en Romo, sanktaj vokitoj: gracon kaj pacon al vi de Dio nia Patro kaj de la Sinjoro Jesuo Mesio.

dankodiro kaj vojaĝo-planoj

8 Unue per Jesuo Mesio mi dankas mian Dion pro vi ĉiuj, ĉar en la tuta mondo oni parolas pri via fido. 9 Dio, kiun tutkore mi servas por la bona mesaĝo de Lia filo, estas mia atestanto, ke senintermite mi memoradas vin. 10 Ĉiam denove mi petegas Lin en miaj preĝoj, ke Lia volo fine ebligu al mi veni al vi. 11 Ĉar arde mi deziras vidi vin, por ke mi havigu al vi ian spiritan donacon por fortikigi vin, 12 aŭ pli ĝuste, por ĉe vi kaj kun vi ĝui la konsolon de nia komuna fido, via kaj mia. 13 Vi ja sciis, gefratoj, ke jam ofte mi intencis viziti vin, kvankam ĝis nun ne eblis¹, por same kiel ĉe la ceteraj popoloj iom rikolti ankaŭ ĉe vi. 14 Mi estas ŝuldanto al Grekoj kaj barbaroj², al saĝuloj kaj neinstruitoj; 15 de tio do mia avideco heroldi la bonan mesaĝon ankaŭ al vi, tie en Romo.

la temo de la letero

16 Pri ĉi bona mesaĝo mi ne hontas. Ĝi estas ja Dia potenco por savi ĉiujn, kiuj fidas <je ĝi>, unue la Hebreojn sed ankaŭ la Grekojn. 17 Ĉar en ĝi riveligis la justeco de Dio, surbaze de ĉiam kreskanta fido³, kiel skribitas: *la justulo el fido vivos*.

la gojoj pekas

18 Sed el la ĉielo riveligis la kolero de Dio super la malpioj kaj

* Kursivo en la traduko mem indikas citon fare de Paŭlo.

¹ Rom. 15: 22-29

² Barbaroj laŭ la Greka esprimmaniero estas ĉiuj ne-Grekoj.

³ Laŭlitere: el fido al fido.

⁴Laŭ Paŭlo, la homoj *laŭnature* konas Dion aŭ minimume povas koni Lin, ĉar Ties agojn ĉiu povas mem vidi en la kreaĵaro. Kelkaj homoj intence rifuzas agnoski kaj honori Dion, kaj anstataŭe kvazaŭ-diigas difinitajn kreitaĵojn („bildigoj de homoj... bestoj”) kaj pro tio tiujn homojn Dio punas per seksa malorientiĝo. La modernan noción de samseksemo (gejeco) kiel unu elinter pli malpli klaraj seksaj orientiĝoj tiu-epoke oni ne konis. Laŭ kelkaj, supozeble Paŭlo i.a. pensis pri homoj el la rondo de ekzemple imperiestro Nerono, kiuj ‘por amuziĝo’ – kvankam mem profunde aliseks-emaj – foje ekagis samsekseme ‘por ankaŭ foje ekprovi tion’.

la maljusto de ĉiuj, kiuj subpremas la veron [en maljusto].⁴ 19 Ĉar kion la homo povas scii pri Dio, ja klaras: Dio ĝin malkaŝis al ili. 20 Ĉar depost la kreo de la mondo Liaj nevideblaĵoj vidiĝas – se tion oni komprenas – en Liaj laboraĵoj, nome Liaj eterna potenco kaj Dieco. Tial ne eblas pardoni ilin.

21 Ĉar kvankam Dion ili konis, ili ne donis al Dio la ŝuldatan honoron kaj dankemon. Sed ilia tuta pensado vaniĝis, kaj obskuriĝis ilia koro, kiu forĵetis la komprenon. 22 Ili asertis esti saĝaj, sed montris sin stultuloj. 23 *La majeston* de l’ nepreema Dio *ili interŝanĝis por bildigoj* de homo pereema, de birdoj, kaj de kvarpiedaj aŭ rampantaj bestoj. 24 Tial Dio transdonis ilin al iliaj malpuraj pasioj, tiel ke sian korpon ili senhonorigis.

25 La Dian veron ili interŝanĝis por la mensogo kaj la kreon ili honoris kaj adoris anstataŭ la Kreanton; benata Li estas poreterne. Amen. 26 Tial Dio transdonis ilin al senhonorigaj pasioj. Iliaj virinoj interŝanĝis la naturan interrilatadon kun la kontraŭnatura. 27 Same ankaŭ la viroj delasis de l’ natura uzado de la virinoj kaj ekflagris ambrule unuj por la aliaj: viroj malĉastas kun viroj. Tiel en sia <korpo> ili ricevas la merititan pagon por sia erarado.

28 Kaj ĉar ili ne degnis rekoni Dion, Dio transdonis ilin al ilia senvalora emo, tiel ke ili faras kio ne decas. 29 Ili plenas de ĉiaspeca maljusto, malvirto, akaparemo kaj malbono; plenas de envio, sangavido, kverelemo, trompo kaj malico. Klaĉemuloj ili estas, 30 kalumniantoj, malamantoj de Dio, trokuraĝaj, fieregaj, parademaj, eltrovemaj en la malbono, malobeaj al la gepatroj, 31 nesaĝaj, senstabilaj, senaj je amo aŭ kompatemo. 32 Konsciente pri la verdikto de Dio, ke kiu faras tiaĵojn, meritas la morton, ili <tamen> ne nur plenumas tiujn <krimojn>, sed eĉ aplaŭdas la plenumantojn.

Ĉion mi devas scii, mi lernis de la arkeo de Noa

1. Ne maltrafi la boaton. (Anglalingva esprimo, kiu signifas: Ne estu malfrua.)
2. Ne forgesu ke ĉiu estas en la sama boato. (Ĉiu el ne havas la samajn problemoj.)
3. Planu antaŭe. Ne pluvas tiam, kiam Noa konstruas la arkeon.
4. Restu sana. Tiam, kiam vi atingas 600 jarojn, iu eble petos ke vi faru ion vere grandegan.
5. Ne aŭskultu al la kritikantoj, nur faru tion kio necesas.
6. Konstruu vian futuron sur alta tero.
7. Pro la motivo de sekureco, vojaĝu duope.

8. Du kapoj estas pli bonaj ol unu.
9. Rapideco ne ĉiam estas avantaĝo. La helikoj estis surŝipe kune kun la gepardoj.
10. Tiam, kiam vi estas stresita, flosu portempe.
11. Memoru ke la arkeo estis konstruita de amatoroj; la *Titanic* estis konstruita de profesiuloj.
12. Memoru ke pegoj interne estas pli granda minaco ol la ŝtormo ekstere.
13. Ne zorgu pri la ŝtormo. Tiam, kiam vi estas unu kun Dio, ĉiam ĉielarko atendas.

Anonima teksto
en traduko de Edwin HARLER

Nekrologoj

Harald ANDERSSON, Hällefors, Svedio

Harald naskiĝis en Bredsjo la 17-an de novembro 1914 kaj havis sian junageon en Hällefors. Li iĝis aŭtoriparisto kaj havis propran riparejon. Al SMF (Sveda Misia Federacio) li aliĝis, sed forlasis en 1978. Jam frue li lernis Esperanton kaj iĝis membro de KELI kaj SEF (Sveda Esperanto-Federacio) en 1935. Kiel pensiulo li translokiĝis al Lesjöfors, ĉar li havis grandan intereson por la agado de Esperantogården kaj aĉetis propran domon. Li ricevis pulmoniflamadon kaj venis al malsanulejo. Al lia hejmloko li translokiĝis en februaro 2000 kaj samtempe donacis sian domon al Esperantogården.

Harald mortis la 15an de decembro 2000 kaj la funebra ceremonio okazis en la preĝejo de Hällefors la 4an de januaro 2001. Li estas karmemore funebrata de genepoj kaj la Esperanto organizoj.

Sven BERGVALL, Karlskoga, Svedio

Sven naskiĝis la 11-an de novembro 1917 kaj iĝis inĝeniero. Jam en 1940 li aliĝis al KELI. Li estis aktiva membro de la baptista komunumo en Karlskoga, kie li apartenis al la estraro kaj havis plurajn taskojn. Sven BERGVALL mortis la 9-an de decembro 2000 kaj la funebra ceremonio okazis en la baptista preĝejo la 29-an de decembro 2000. De longe li ne estis membro de la Sveda Eklezio. Sven estas karmemorata de lia filo Lars kun familio, la baptista eklezio kaj KELI.

Arne LUNDKVIST

Kaj jen malgaja sciigo: nia kara, aktiva kaj multjara fratino **Marjatta LINJAMA** akiris nombron de siaj vivtagoj je 2001-03-31 kaj Dio alvokis la lacan infanon hejmen post kelkmonata malsano.

Psalmo 104:15-16

Soili SALMINEN



Tiuj, kiuj partoprenis en la kongreso, memoras pri tiu juna knabino prezentita al Dio dum la kongresa Diservo. Mia filino Anne, tiu mem, estis ĵus baptita dum Pentekosto ĉijare en la Reformita Preĝejo en Poitiers.

Tagordo de la jarkunveno de KELI, 2001

1. Malfermo
2. Elekto de kunprotokolantoj
3. Funebra memorigo
4. Sekretariajarraporto
5. Kasistajarraporto
6. Raporto de la kaskontrolantoj
7. Buĝetoj
8. Jarraporto de la redaktoro de *Dia Regno*
9. Esperanto-Misio
10. Estrar-elekto. Ĉijare finiĝas la deĵorperiodo de Els VAN DIJK (sekretario), Britta REHM kaj MA Young-Tae. Els kaj Britta estas reelekteblaj sed MA Young Tae ne rekandidatas.
11. Kongresaj planoj. En 2002 okazos la Universala Kongreso en Brazilio kaj en 2003 en Göteborg (Svedio). La Hungaroj proponis organizi Kristanan Kongreson en 2002 en Bereksfürdő.
12. La estonteco de KELI
13. Ideoj kaj sugestoj de la membroj
14. Fermo

Els VAN DIJK

*Nun la bona temp' por ni
venis, nun kun graco
venis sur la teron Di',
ke fariĝu paco.*

*Ĉiujn nun invitis Li
el proksim' kaj foro.
Venu kaj rigardu vi!
Ĝoju pri la horo!*

*Vi ekiru, venu al
la infano Dia,
kiu kuŝas en la stal',
jen en trogo sia.*

Poemo el Slovakio.

Mi trovis tiun ĉi poemon en la numero 52/2000 de la eklezia gazeto „Kirche und Leben” („Eklezio kaj Vivo”) de la katolika episkopejo de Monastero/Vestfalia (Münster/ Westfalen), sur la paĝoj 8/9 de la aldonajo „Familien-Journal” („Familia ĵurnalo”).

El origina germanlingva teksto esperantigis: Manfredo RATISLAVO je la 31.12.2000 — 01.01.2001 laŭ la origina germanalingva teksto.



*Leviĝis Sun',
tagiĝas nun,
la nokto iĝis for.
Sub ĉielblu'
jubilas plu
de l' birdoj vigla ĥor'.*

*Floreto jam
en la ornam'
de sia petalar'
malfermis sin,
ĝojigas nin
per sia rosa klar'.*

*Ja iĝas for
de l' kor' dolor',
se ĝin rigardas vi.
De l' Tero rond', 1)
la tuta mond',
belega estas ĝi!*

Verkita de sinjoro KNAPP, Alfred.

Esperantigis: Manfredo RATISLAVO en Februaro de 2001 laŭ la origina germanalingva teksto.

Origina german-lingva teksto de Alfred KNAPP

Manfred RETZLAFF
Stettiner Straße 16
DE-59302 Oelde

1) aŭ: La Tera rond'